

ESPERANTO

★ TRIUMFONTA ★

Publikigilo de multaj gravaj Esperantistaj organizaĵoj.

Aperas semajne. — Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolsciencia).

Protektantoj:

Dr. Leono Zamenhof, Warszawa
W. M. Page, adv., Edinburgh
Ernest Archdeacon, Paris
J. Gili Noria, komercisto,
Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto,
București
Frans Schoofs, Antwerpen
P. v. Medem, bank-kaj fabrik-
direktoro, Kaunas.

N-o 165
11. 11. 1923

Redakcio:

Cefredaktoro: Teo Jung.
Redaktoro: Robert Kreuz.
Redekciaj kunlaborantoj:
H. Jung
M. Butin, L. K.

Administracio:

(Preciza poŝtadreso)
Esperanto Triumfonta
Horrem bei Köln, Germanlando.

Tarifon

vidu sur speciala folio, kiu estas aldonata al ĉiu specimeno kaj unua numero de nova abono.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

Nova sukceso en Brazilio.

La konsilantoj de la brazila ĉefurbo Rio de Janeiro s-oj Felisodoro Gaya kaj Edgard Teixeira prezentis leĝan projekton, per kiu estos konsiderata kiel unu el la meriokondiĉoj por la rangaltigo de la publika instruistaro de Rio de Janeiro la instruado de la lingvo Esperanto almenaŭ dum unu lernjaro.

La komitatoj pri juro kaj instruado aprobis unuanime la favorajn raportojn prezentitajn al ili de s-oj Victor Bastos kaj Zoroastro Cunha.

La leĝa projekto estas jam aprobita en unua diskutado.

Informo de Brazilia Ligo Esperantista.

Esperanto-Akademio.

Jus okazis la elekto de la plena estraro de la Esperanto-Akademio. Krom s-o Prof. Cart, Paris reelekta kiel prezidanto (komp. ET 163) la estraro nun konsistas el la sekvantaj personoj:

Vicprezidantoj:

s-o Prof. D-ro J. Dietterle, Leipzig.
s-o W. Warden, Edinburgh.

Direktoroj:

s-o Grosjean-Maupin, St. Maurice, Francujo (Komuna Vortaro),
s-o D-ro Lippmann, Leipzig (Gramatiko),
s-o D-ro Edm. Privat, Genève (Konkursoj kaj Premioj).

Socia vivo.

Socialaj studoj.

De R. Civinski, Petrograd.

Ni publikigas sub tiu ĉi rubriko serion da artikoloj pri diversaj socialaj problemoj. Ne identigante nin kun la enhavo aŭ propagandante ĝin, ni juĝas ĝin interesinda. La aŭtoro mem diras pri la hodiaŭa artikolo: „Tiu-ĉi mia artikolo ne prezentas ian okazan penson aŭ aparte prilaboritan problemon de mi, sed nur tre skize desegnitajn tute malgrandajn pecojn, sendiŝige-forie kaj konsekvence-logike kunligitajn kun mia tute speciala filozofie-sociologia doktrino „saismo“ (aŭ „social-arhitekturo-ismo“), disvolvita tufilanke kaj tute plene nur sur unu fundamenta filozofia bazo, prenita el nova fama scienco elirovaĵo nome „principio de relativeco“, larĝigita de mi trans la limoj de mondo fizika ĝis la limoj de mondo psika. Tiu-ĉi doktrino, „saismo“, celas konstrui tute ne-ŝtatan, i.e. objektivajn sciencan, filozofie-sociologian mondokoncepton.“

Ni estas tre dankaj por eventuala sendo de artikoloj, priiraktantaj la problemojn laŭ alia vidpunkto.

La Redakcio.

Efektiva kaŭzo de militoj.

I.

La demando pri la kaŭzo de militoj estas sendube unu el plej gravaj demandoj de la politike-sociala vivo de l' homaro. Efektive, se ni tute certe kaj difinite sciis pri plenerfa kaŭzo de militoj, tiam ni povus scii, kien kaj kiel ni devas direkti la plej potencajn fortojn de homa intelekto por forpeli por ĉiam tiun grandegan malbonaĵon el nuntempa politike-sociala vivo de l' homaro, kiu sendube prezentas la militoj. Kvankam ĉie kaj ĉiam oni krias tre forte kaj varmege pri la multdiversaj teruraĵoj de militoj, pri diversaj multnombraj ruiniĝoj de materialaj kaj spiritaĵaj valoroj de homara kulturo pro militoj, tamen ĝis nun bedaŭrinde en nia tempo, same kiel en pratempe, militoj ekzistas kaj de tempo al tempo okazas

diversloke kaj ĉiam kun pli kaj pli kreskanta forto, sireteco, largeco, terureco ktp., kaj neniu homo povas nun certe diri kiam estos vera fino al ili.

Tamen eble ili estas ekzistantaj eterne dum ekzistas homaro sur la tero. Tiel nome ja asertas multnombraj malĝojecaj skeptikuloj. Mi devas tuj kaj plene difinite diri, ke mi persone ne apartenas al ili. Mi ne apartenas al ili pro tio, ke mi havas en mi grandan kredon en trege fortan potencon de homa intelekto. Pro tio, ke io ne ekzistis antaŭe, aŭ ne ekzistas nun, neniu povas aserti, ke ĝi neniam povas ekzisti estonte. Kvankam en pratempe homo imagis fulmon kiel dion, hodiaŭ tamen li surmetas sur tiun-ĉi dion la sakon de poŝtisto kaj devigas tiun-ĉi dion, servi nun al homo per elektroforato al homaj poŝt-kaj telegraf-rilatoj. Vapor-kaj elektromaŝinoj, aeroplanoj, radiotelefonoj kaj fine Esperanto — ne ekzistis ja antaŭe, sed nun ili ĉiuj ekzistas pro felika homa bonstato, ĉiam pli kaj pli multe alportas plej diversajn servojn al la homo, kaj samtempe ĉiam pli kaj pli multe alportas al ni pruvojn, ke monro je neekzisteco estas tute malpravaj certigo je eterna neekzisteblo; ĉar ja „nenio estas eterna sub luno“ — diras malnova proverbo greka, „ĉio fluas“ — ekmontris al ni ankorat en VI-a jarcento a. Kristo fama antikva filozofo, Heraklitos el Efeso, kaj „nenio en la mondo estas absoluta“ — pruvis fine tute science fama filozofo-scienculo de niaj tagoj, Alberto Einstein. (Elp.: Ainŝtajn).

Kiu do povas tiom kuraĝplombe aserti, ke li scias tute certe kaj precize, kie kuŝas la limoj por homaj kapableco, eltroveco kaj forteco? Se historio de homarkulturo klare montras al ni, ke homa kapableco en teknika regiono okazis vere tre multipotencia, ĉu ni ne povas pro tio esperi kaj kredi, ke en regiono politike-sociala tiu homa kapableco iam estonte same montras tre grandan mirindan disvolvon kaj antaŭe neatenditan belegan sukceson. Mi persone opinias, ke se homo ĝenerale devas ielmaniere kredi, tiam li devas nome kredi je potenco de homa spirito, kiu siavice certe devigas kredi, ke fizikaj, sangaj militoj iam en estonteco nepre malaperos el la homara kunvivo kun ĉiuj iliaj teruraĵoj kaj malfeliciaĵoj. Ke la homaro iam efektive „reforgos glavojn je plugilojn“, konforme al la evangelia parabolo kaj samtempe konforme al la vortoj en la Esperanto-himno efektive atingos tiun tempon, kiam „la popoloj faros en konsento unu grandan rondon familian“. Tiam al homoj anstataŭ „glavo“ kiel juĝisto estos servanta — „racio“!

II.

Mi parolis ĝis nun sole pri kredo je malapero de militoj, ĉar ja nur kun bona kredo je ia afero oni povas alpaŝi al bona kaj sukcesa laboro por ĝia efektivaĵo. Tamen mi deziras en tiu ĉi artikolo paroli tute ne sole pri la kredo je malapero de militoj, sed krom tio — pri provo de vere racia kaj logika solvo de la demando pri malapero de militoj, kiun mi provos konsekvence konstrui je elserĉoj de respondoj pri efektiva kaŭzo de militoj. Tiucele mi komence ekmontras kaj analizos skize jam ekzistantajn nun diversajn teoriojn, kiuj priiraktas la temon pri kaŭzo de militoj.

Jen ni prenos komence sociologian teorion sendube plej disvastiĝintan, plej riĉan literaturon kaj laŭŝajne ankaŭ plej sukceshavantan. Ĝi nomiĝas „marksismo“ (en praktikaj formoj: „social-demokratismo“, aŭ „komunismo“, aŭ „plilulismo“). Ĝi donas, kiel oni scias, je la montrita demando jenan respondon.

Kaŭzo de militoj estas entenata en la ekzisto de nuna homara socio de kapitalistoj. „Kapital-

istoj“, ili diras, estas avidaj parazitaj de homara sociala vivo, kiuj pro iliaj tro granda apetito al diversaj ekonomiaj dolĉaĵoj kaj bonajoj estas devigitaj ekonomie konkuri ĉiam unuj kun aliaj je vendokampoj en diversaj landoj, kaj por tio en okazo de manko da sufiĉaj ekonomiaj fortoj por ili bezonas eluzi fortojn militajn de militistaro de siaj landoj por subigi al si per milito konkurantan malamikon. Por tia celo kapitalistoj havas je sia ĉiutempa servo tre servemajn al ili registarojn en ĉiuj kapitalistaj landoj. Tiel predikas la Marksanoj kiel simplan solvon de la problemo pri malapero de militoj: forpeli aŭ nenigi kapitalistojn el ĉiuj landoj de la mondo kaj militoj tuj — samfore kaj eterne — malaperos.

Sed jen elpaŝas kun kontraŭdiraj al Marksanoj reprezentantoj en alia politika koncepto, kvankam sendube malplimultnombraj ol la unuaj, tamen ankaŭ havantaj nuntempe sufiĉe grandan disvastiĝon, signifon kaj literaturan sukceson; tio estas reprezentantoj de la doktrino — „anarĥiismo“. Anarĥiistoj ordinare kontraŭdiras al Marksanoj: „Vi asertas ĉiam, ke ĉefa kaj sola kaŭzo de militoj estas kapitalistoj, tamen — daŭrigas ili kun indigna sarkasmo — de kiu kapitalistoj ia ricevas forton por militoj? Ĉu ne de registara potenco? Sekve de tio registaroj, ĉiu regna potenco kaj laŭ sama grado la marksisme socialisma potenco estas efektiva kaŭzo de militoj.“ (Daŭrigo sekvos).

Industriaj malsanoj. —

Kunveno de Spertuloj en Genève.

Internacia Komitato de Spertuloj pri Industria Higieno, nomita por helpi la Internacian Laboran Oficejon de la Ligo de Nacioj en la studo de demandoj pri la sano de la laboristoj, kunvenis en Genève la 13.—15.-an de septembro 1923. El la jus aperinta detala protokolo ni ekstraktas la jenan: La komitato estas starigita laŭ rezolucioj balotitaj de la Internacia Labora Konferenco en Washington en 1919, kaj konsistas el kuracistaj laborinspektistoj kaj aliaj teknikuloj kaj scienculoj pri industria higieno, apartenantaj al ĉirkaŭ dekdu landoj.

La Komitato diskutadis du temojn, tio estas: 1) la protokolo kontraŭ karbunkolo de laboristoj manipulantaj haŭtojn kaj peltojn, kaj 2) la redakcio de listo de la ĉefaj industriaj procedoj, kiuj devas esti konsiderataj kiel malsanigaj.

Pri la unua el tiuj demandoj, la Komitato balotis rezolucion deklaran, ke la plej efika metodo por certigi la sukceson de esplorado pri desinfektaj rimedoj estus la starigo de naciaj komitatoj, kiuj laborus sub la ĝenerala direktado de la Higiena Komitato de la Ligo de Nacioj. Utilus ke la membroj de tiuj komitatoj estu nomataj post konsulto de la Higiena Komitato de la Ligo de Nacioj kun la Registraraj Departementoj respondecaj pri la aplikado de la leĝoj pri fabrikoj en ĉiu lando.

La studo de la dua problemo diskutita de la Komitato ampleksas ne nur la zorgan ekzamenon de la danĝero kontraŭ la sano de tiuj procedoj kaj laboroj, sed ankaŭ la kolektadon de ĉiuj haveblaj sciencaj kaj statistikaj informoj rilataj al ĉiu procedo. Multe da konataj spertuloj en diversaj landoj jam konsentis kunlabori je la preparado de tiu listo.

Subtenu la oficialajn
instituciojn!

Kiu rapide donas, tiu donas duoble.

Kroniko.

Por servi nian legatanton per ĉam aktuala, fidinda kaj kompleta informaro, ni bezonas scilgion (sen postskribo aŭ aparta folieto unuflanke skribita, sed ne inter administraci- aŭ privataj scilgion) pri ĉiu novaĵo (Esp. movado, kondiĉoj, raporto, koncilio, fidinco, legobilo (precipe nomoj)).

Landoj.

Ameriko.

Brazilio.

Rio de Janeiro. La 3. okt. okazis ĉe la luksa salono de "Centro Paulista", tekunveno je la honoro de la plej malnovaj anoj de Brazilia Klubo "Esperanto", fondita en 1906, kaj por akcepti la novajn. Faris la oficialan saluton la dua sekretario Ĥino Maria Luiza Bocayuva, kies kama elparolado estas bonega propagandilo pri la belsoneco de Esperanto. Dankante parolis D-ro Theobaldo Recife kaj D-ro E. Backheuser, la ĉefindinto de tiu klubo. Post la parolado de la prezidanto, D-ro Carlos Domingues, oni kantis la himnon "La Espero" kaj dancis ĝis la sepa vespero. La orkestra estro estis malnova Esperantisto s-o Quirino de Oliveira.

S-o José Officina, tre konata profesoro de portugala lingvo kaj ĵurnalistoj, skribis en "Correio da Manhã", unu el la plej legatitaj ĵurnaloj en Rio de Janeiro, ĉefarĥikon por Esperanto kiel respondo al kontraŭ-artikolo skribita de s-o Ibiapina.

Plene detruinte liajn kontraŭfajlojn li finis sian artikolon per la jenaj vortoj: "Tiel, do, nek la filologia teorio, nek la sperto kontraŭstaras al la akcepto de internacia helpla lingvo. Malgraŭ la opinio de s-o Ibiapina, la superbonegeco de Esperanto super la ceteraj proponitaj lingvoj estas trece pruvita."

Aŭstralio.

Armadale, V. Nova grupo fondiĝis en Armadale, laŭnome "La Persista Grupo". La kunveneto estis 62 Northcote Road, Armadale, kie la membroj renkontiĝis ĉiumerkredon je la oka vespero. Prezidanto estis s-o Byatt, sekretario Ĥino Thomas, kasistino Ĥino Byatt. La grupo aliĝis al AEA nun laŭdinda rapideco.

Melbourne, V. D-ro Fred J. Williams, tre entuziasma Esperantisto, vicprezidinto de la kongreso de Sidney, antaŭ nelonge iris al la insuloj Novaj Hebridoj, por tie entrepreni kuraĉistajn devojn.

Newcastle, N.S.W. La nova grupo kiu antaŭ nelonge komenciĝis sub "Workers' Educational Association" (Laborista Eduka Asocio), kreskis al 50 membroj kaj, se oni povas juĝi laŭ la entuziasmo, farigos unu el la plej gravaj en Nova Sud-Kimrujo. La grupo tre deziras ricevi malnovajn gazetojn kaj librojn.

Oakleigh, V. La 30. aŭg. antaŭ la filio de la A.N.A., s ino Bigelow kaj s-oj Byatt, kaj Hudson parolis pri Esperanto. La ĉeestantoj tre interesiĝis kaj aĉetis diversajn lerolibrojn.

Sidney, N.S.W. La Senato de la Universitato de Sidney lastmonate donis sian oficialan aprobon permesante la starigon de Esperanta grupo inter studentoj de la universitato. Ĝis nun 16 studentoj aliĝis kaj klasoj kunvenas ĉiusemajne en unu el la lernejoj sub energia gvidado de s-o J.N. Edmunds, konata lingvo-instruisto. Tiu klaso ne estas parto de nova universitata lernejo, sed tute memvola lernejo kaj okazas dum liberaj horoj.

"KA" (Internacia Kŭitolo) fondiĝis filio ĉi tie. Lia Moŝto, ĉefepiskopo Kelly, benis la asocion kaj D-ro Sheehan, kunganta ĉefepiskopo, prezidis la inaŭguran kunvenon. Granda ĉeestantaro akleme akceptis Esperanton kiel oficialan lingvon. La "Daily Telegraph" de Sidney longe raportis pri la protokolo.

Dum aŭgusto du intereseĝaj prelegoj okazis ĉe Sidney'a Esperanto-Societo. "Naciaj humoristoj" estis la temo, kiu s-o A. Feldmayr pritraktis kaj en facila maniero li rakontis humorajn el la vivo de kelkaj pli aŭ malpli konataj humoristoj germanaj kaj turkaj. — La alia parolanto estis s-o J.N. Edmunds, instruisto de japana lingvo ĉe gimnazio, kiu elektis la temon "Ellenante lingvon". S-o Edmunds (parolante angle) montris la ĝeneralan malfacilon de lingvistoj kaj diris, ke eĉ Esperanto ne povas esti ellernata en 10 lecionoj aŭ 4 semajnoj, escepte, eble, de eksterordinaraj personoj. Oni devas lerni kaj kompreni lingvon same kiel aliajn objektojn kaj tio nur estas ebla per profunda studado. Li diris, ke la Esperanto movado bezonas spertajn Esperantistojn kaj ĉiuj devas celi perfektigon.

Eŭropo.

Hungarujo.

Ujpeŝti (80000 loĝ.). Antaŭ 1 1/2 jaroj kun 20 p. fondiĝinta laborista grupo nun havas 97 anojn. La 14. 10. estas elekta nova estraro. Prez. Jozefo Kócsán, viceprez. Julio Jäger, sek. Vilhelmo Bleier, kas. Francisko Polgár, protokolanto Adalberto Bleier. — Unu kurso kun 50 komencantoj, alia kun 10 p. — Ĉi jare komenciĝis 4 kursoj kun entute 160 p. La 5. 10. propagandaparolado en Laborista Hejmo kun 70 p. — Du kincmatografioj anonas Esperanton per lumbildoj. — 16. 9. estas aranĝita kabaredvespero, kiu profitis 110000 kr. h. kaj 50 kursojn. — Dank' al klopodo de Elizabeto Kovács, aperis artikolo longa pri Esperanto en "Könyvkiadó Lapja" (Gazeto de Bindistoj).

Rákospalota (25000 loĝ.). Komencia kurso en "Laborista Hejmo" kun 25 p. — En ĉi tiu jaro komenciĝis tie ĉi 5 kursoj kun 120 p. — La funkciadon de la fondiĝinta "Laborista Grupo" la polico ĉesigis. — 20. 10. estas aranĝita propagandovespero kun kabaredo. Profito estis 80 kursojn kaj 90000 h. kr.

Pestŭtŭhely (10000 loĝ.). Funkcias du kursoj kun 60 p. Gvidanto E. Klammert. 28. 10. propagandaparolado dum oficiala membro-kunveno de socialdemokrata partio, Esp. grupo fondita.

En ĉiuj tri lokoj la Ujpeŝta laborista grupo propagandas per la helpo de lokaj grupoj de soc. partio mem. Adreso de la grupo estas: Bleier Vilmos, Ujpeŝti, Virág-u. 9 sz. Hung.

Grupkunvenoj ĉiutage — krom lunde kaj dimanĉo — en la "Laborista Hejmo" Ujpeŝti, Gyár-u. 45 sz., vespere 7-10 h.

Nederlando.

Leiden. La laborista klubo, sekcio de la Ned. Fed. de Lab. Esperantistoj, post konstanta anoncedo en diversaj gazetoj, buŝa propagando, kaj per persona klopodo, sukcesis akiri la kunhelpon de la Estrino de la Popoldomo de Leiden (Leidsche Volkshuis).

Sekve de tio en la Popoldomo estas okazinta Publika Kunveno.

S-o Dufrenne paroladis pri la Historio de Esperanto kaj s-o Mast klarigis la lumbildojn, kiuj montris la plej belajn lokojn de Nürnberg, fotografitaj dum la XV-a kongreso.

La rezultato estis: Fondo de nova kurso. 25 partoprenantoj. Gvidanto s-o P. Kallenberg. Samtempe s-o Westelius gvidos kurson por personoj, kiuj jam iam lernis Esperanton. Tiu ĉi kurso ankaŭ okazigos en la Popoldomo.

La Leidena grupo ankaŭ en Noerdmyk apud Maro fondis novan kurson kun 14 partoprenantoj. Gvidanto: s-o P. J. Hoop.

Ankaŭ s-o Kaldermann gvidas kurseton (5 p.) en sia domo.

La gekursanoj de la fininta kurso aliĝis al Sekcio de Leiden.

Polujo.

BYDGOSZCZ. Libervolaj kunvenoj de loka "Societo Esperanto" okazas nun ĉiutage de la prezidanto s-o Prangel en str. Poznańska 13. Por grandaj kunvenoj aŭ aliaj aranĝoj daŭre restos je societa uzo la de la urba magistrato afable disponigita urba lernejo de "Comenius".

LUBLIN. La 29. sept. okazis solena malfermo de la klerigaj kursoj por plenkreskuloj, aranĝitaj flanke de Lublina Konsum-Kooperativo en loka vira seminario instruista. Al la inter aliaj aranĝita Esp. kurso anoncis 59 p.

M. Hoszcza (Rowne). Fondiĝis Esp. grupo. Funkcias kurso, gvidata de s-o Gelrud.

Radom. Daŭra fervora propagando de s-oj Kijak kaj Rubinstein, kiu forveturis nun Kraków-on al "Collegium medicum" por plua studado. Oni eldonis kaj propagandis kelkmilojn da efikaj Esp. flugfolioj.

Skoite. Esp. grupo estos fondata de favore propagandanta s-o Grosman.

Plus oni komunikas pri plivigliĝa Esp. movado en la pollinga teritorio de Cecha Silezio, nome en Sionawa (s-o Badura) kaj en la najbaraj lokoj de minejaroj Karvina kaj Ostrava.

Gazetaro.

L'Index, Paris. Kun Esp. notoj. International de l'Enseignement, Saumur: Plurfoja mencio de Esp. inter gazetoj abon. de la konc. federacio.

Aperis krome 50 propagandaj artikoloj en "L'Indépendant", "Le Cri Catalan", "L'Action", "Syndicale" (Perpignan), "La Dépêche" (Toulouse), "Le Petit Méridional", "L'Éclair" (Montpellier).

Raporto de Gazetservo de Hungara Esp. Instituto. Aŭg.-sept.

Nemzeti Újság, aŭg. Pri Esp. kongreso katolika, 28. aŭg. Pri Esp. kongreso venona.

Pester Lloyd, Pesti Hirlap, 26. aŭg. Pri blindula kongreso. Pesti Napló, Világ, Magyar-ság, 2. sept. Landa Esp. kunveno.

Nemzeti Újság, Magyar-ság, Világ, 6. sept. Policista kongreso kaj Esp.

Szegedi új nemzedék, Szeged, 7. sept. Policista kongreso kaj Esp.

Szózat, Budapest, 8. sept. Policista kongreso kaj Esp.

L'Écho de Danube, 4. sept. Ruĝa aeroplanaro kun Esp.

Somogyi újság, Kaposvár, 8. sept. Studanta grupo.

Pécsi lapok, Pécs, 22. jul. Leipzig Fairo — 15. aŭg. Detala raporto pri Nürnberg Kongreso. — 19 kaj 30. aŭg.

Mallonga raporto pri Nürnberg Kongreso. — 12. julio. Lau "Informilo" pri sveda situacio. — 7. sept. Frankfurta Fairo. Nova kurso de Esp.

Reggeli Hírek, Miskolcz, 29. aŭg. Hungaroj en Nürnberg. — 2. sept. Frankfurta Fairo.

Miskolczy Napló, Miskolcz, 18. aŭg. Radiotelegrafo kaj Esp. laŭ "Les Echos".

Dunántúli Hirlap, Győr, 25. aŭg. Artikolo de Gieswein pri sia vojaĝo.

Keleti Népe, Budapest, sept. Artikolo de Gieswein pri sia vojaĝo.

Friss Hírek, Szeged, 24. jun. Mondekspozicio en Bruxelles laŭ sciigo de ET. Bulieno Germanlanda kaj Esp. prop.

Laboristaj libertempoj laŭ Esp. raporto de Internacia Laboroficejo.

L'Écho de Danube, Budapest, 2. sept. Finna Fairo laŭ Esp. servoj. — 19. aŭg. Esp. kongreso en Budapest. — 26. aŭg.

Pri blindula kongreso kaj Nürnberg Kongreso. — 15. sept. Pri Kŭlta Fairo laŭ ET.

Köszeg és vidék, Köszeg, 9. sept. Esperantistoj en Münchena Bierfabriko. Esp. kunveno en Budapest.

Vasvármegye, Szombathely, 2. sept. Hungaroj en Nürnberg. — 3. sept. Esp. grupkunveno. — 15. sept. Blindula kongreso. — 14. sept. Esp. grupkunveno.

Hir, Szombathely, 14. sept. Esp. grupkunveno.

Pesti Napló, Budapest, 16. sept. Esp. literatura vespero en Budapest.

Pester Lloyd, Budapest, 17. sept. Esp. literatura vespero en Budapest.

Világ, Magyar-ság, Pester Lloyd, 25. sept. Esp. literatura vespero pri Viktoro Kócski.

Magyar-ság, 25. sept. Pri religia kongreso en Washington laŭ ET.

Nagykőrös és Vidéke, Nagykőrös, 20. sept. Pri sendanĝera eksplodsocieto kaj Esp. laŭ sciigo de ET.

Scienco.

Mineralogio.

Orminejo en Bulgarujo.

En la ĉirkaŭaĵo de la urbo Ĉirpan (suda Bulgarujo), proksime de la vilaĝo Radomir estas eltrovita riĉa orminejo. La oro troviĝas miksite en sabligranaj granitaj tavoloj. Laŭ la faritaj antaŭaj esploroj el unu kuba metro da tia granita sablo estas ekstraktitaj 20-22 gramoj da oro — procentaĵo tre granda. Sed laŭ asertoj de kompetentuloj la procentaĵo de la oro en la subaj tavoloj de la grundo estos ankoraŭ pli granda, ĉar pro sia pipezeco la oro ĉe la dispeĉigo de la granita roko falis suben, sekve la mincio estas unu el la maloftaj pro sia riĉeco je oro.

La perimetro, en kiu la minejo troviĝas, estas donita de la ŝtato koncesie al kompanio de 30 personoj por serĉo de oro kaj al ili estas nome la rajto de ekspluato. La tuta kompanio tamen ne disponas la necesajn por tiu celo kapitalojn.

G. S.-V. Sofia.

Lingvoscienco.

La lingva problemulo sur insulo Malta.

La lingvo Malta, la sola lingvo de la granda plimulto de la loĝantoj de la insulo, estas interesa postrestaĵo de antikvaj tempoj. La lingvo de kulturo estis ĥiala, sed nun plimulte Angla.

Kiel harmoniigi la tri lingvojn por la instruado estas demando kiu la nuna Administrantaro devas solvi.

Maltingvaj ĵurnaloj presitaj per Eŭropaj literaj publikigis de post la jaro 1858 ne nur sur la insulo Malta, sed malpli frue en Egiptujo kaj en Ameriko (Detroit).

Arkeologio.

Rimarkinda trovajo.

En Rusujo, en Luga (urbeto en Petrograda gubernio) dum foslaboroj estas trovita bronza skulptaĵo de Budha, laŭkalkule 2000 jara.

R. L.

Geografio.

Supreniro sur Kazbekon.

Oni skribas el Tiflis (Georgio): Ekspedicio de 18 partoprenantoj, gvidata de docento Nikoladze kaj gvidisto Kezanavili supreniris Kazbekon (5.045 m. alta) malgraŭ 20-grada frosto (laŭ skalo de Réaumur) kaj foriega neĝado. La ventego estis tiom furioza, ke la suprenirantoj estis devigitaj alĝi sin unu al la alia.

Por atingi la supron de l' montego, la ekspedicio estis elhakinta 1200 ŝtupojn en profunda, glaciiginta neĝo.

R. L.-M. Rig.

La sorto de Yokohama.

Latvia Telegrafa Agentejo (LTA) laŭ sciigoj el Japanio raportas, ke la japana registaro decidis ne rekonstrui la multe detruitan urbon Yokohama.

Por anstataŭi ĝian havenon oni pligrandigos la areon de tiu de Tokio.

Statistiko.

Geedziĝo, naskiĝo kaj morto en Moskvo kaj Petrograd 1910-1920.

1000 kazoj da loĝantarsanĝo (geedziĝoj + naskiĝoj + mortoj = 1000) konsistis

| | M. | P. | | M. | P. | | M. | P. | |
|------|----|-----|-----|----|-----|-----|----|-----|-----|
| 1910 | el | 57 | 59 | el | 552 | 299 | el | 265 | 250 |
| 1911 | " | 60 | 65 | " | 542 | 292 | " | 265 | 226 |
| 1912 | " | 58 | 65 | " | 555 | 264 | " | 244 | 214 |
| 1913 | " | 60 | 65 | " | 532 | 246 | " | 247 | 214 |
| 1914 | " | 55 | 60 | " | 510 | 250 | " | 240 | 215 |
| 1915 | " | 41 | 50 | " | 269 | 225 | " | 240 | 228 |
| 1916 | " | 59 | 47 | " | 229 | 191 | " | 250 | 252 |
| 1917 | " | 55 | 89 | " | 196 | 189 | " | 257 | 289 |
| 1918 | " | 75 | 92 | " | 148 | 156 | " | 249 | 457 |
| 1919 | " | 174 | 207 | " | 174 | 155 | " | 461 | 726 |
| 1920 | " | 194 | 277 | " | 221 | 218 | " | 578 | 506 |

Kresko de prezoj (meze) en Rusujo.

| | | | |
|-----------------|-------|--------------------|-----------|
| Komenco de 1915 | 1.0 | Komenco de 1920 | 1555.0 |
| 1916 | 1.9 | 1921 | 22700.0 |
| 1917 | 5.0 | 1922 | 194900.0 |
| 1918 | 21.4 | Januaro-febr. 1922 | 405000.0 |
| 1919 | 123.4 | Januaro-marto | 1000000.0 |

H. Fr., Kazan.

Tekniko.

Grandsignifa kulturlaboro en Ameriko.

Sub la rivero Hudson, inter New-York kaj New-Jersey troviĝas tuba tunelo por fervojo. Por aerumi la duoblan tunelon oni lastfoje konstruis du kvadratajn putojn. La tratranĉoj de ĉiu puto estas 11,36x15,52 kvadratemprojn granda. La putoj estas bazitaj sur fostoj. La akvo estas nur 10 m profunda, sed la ŝlimotavolo sur la fundo estas 67 m dika. Sub la ŝlimo troviĝas malmola kaj daŭra rokaĵo. Ĝis tie oni enigis la fostojn. La fostajo estas el ferbetono kaj ĉiu fosto havas diametron de 60 cm kaj vanderbecon de 1 cm, ĝia materio estas la ŝtalo kaj longeco 6,1 m. Interne troviĝas betona maso. Al ĉiu puto apartenas 42 tuboj.

Internacia trafiko.

Per aŭtomobilo tra la Sahara Dezerto.

Konate estas ke dum la milito atakantaj aŭtomobiloj tre facile irakuris teritoriojn plenejn de montetoj kaj fosajoj. Ili povis tion atingi per siaj vermoformaj radoj. En la lasta tempo s-o Kégresse provis kelkajn Citroën aŭtomobilojn por tiu specian radon. Tiu radon krusistas el elasta kaŭĉuko kaj kapablas kuri sur neĝo kaj sablo. Ankaŭ oni sukcesis supreniri per ili deklivojn pli krutajn ol 45°. Oni jam faris aŭtomobil-veturojn per tiuj veturiloj de Algier ĝis Tumbukto. Do hodiaŭ jam la plej internaj partoj de la dezerto estas alireblaj por la homa esplorado.

J. M., Oldbg.

Aerveturado.

Nova rekordo.

La franca aviadisto Montonnier aliĝis per sia aviadilo dum la printempo de la kuranta jaro ĝis 10000 metra alteco. Per tio li atingis novan rekordon. La termometro de lia aviadilo montris la minimumon de — 52° C.

Tiu rezulto de Montonnier estas antaŭ nelonge superita de Sadi Lecoine, kiu en Villacoublay atingis la altecon de 11000 metroj.

Komerco.

Nova eksporta organizado en Rumanujo.

La komerca kaj industria ministerio prilaboris legoprojekton rilate la nova eksporta organizado.

La fundamenta principo, sur kiu bazoj tiu nova organizado, estas la tuta ĉesigo de ĉia eksportpermeso. La eksporto estu per tio tute libera. La komercaĵoj povas forlasi la landon, sen formala permesa dokumento, se la doganraksoj ĉe la limo estos pagotaj.

Kio rilatas la artikolojn de plej granda neceso,
ec se tiuj ne tute kovros la internan konsumon
de la lando, anstataŭ eksporta malpermeso estos
de la lando, anstataŭ eksportaj dogantaksoj por tiuj
fiksotaj fiam altaj eksportaj dogantaksoj por tiuj
komercotaj ke la vendanto ne havos ian profiton
sendante ilin al alia lando.

Samtempe estus desigata la funkcio de la
supera komitato por Eksporto kaj Importo, kiu
laboras nun ĉe la ministerio.

(Speciala sciigo de la Sviza
kaj Rumana Benko, Bukaresti.)

Internacia sporto.

Piedpilko.

En Bukureŝti ludis la sportkluboj „Levski“
de Sofia kontraŭ la plej fortaj tieaj sportkluboj
„Romkomit“ kaj „Trikolorul“. La rezulto estis:
„Levski“ — „Romkomit“ 1:1; „Levski“ — „Trikolorul“
4:2 por „Levski“. Tiu ĉi venko
de „Levski“ estas des pli grava, ke ĝi
estas la unua venko de la juna bulgara
sportistaro en internacia kampo, venko super la
plej fortaj kluboj en Balkano. En antaŭaj
vetludoj „Trikolorul“ venkis la klubojn de Zagreb
kaj Konstantinoplo.

Je la stadidomo la sportistoj-venkintoj renkontis
al la tuta sportistaro de Sofia kaj la honora
prezidanto de la Sporta Federacio Generalo
Lazarov faris paroladon. De la stadidomo sub
la sonoj de muziko la sportistoj direktis sin al
la centro de la urbo kie antaŭ la Milita Klubo
la prezidanto de la Sporta Federacio parolis pri
la signifo de tiu ĉi unua venko; poste estis
servita vespermanĝeto por festi la venkon.

Oficialigo de Esperanto
en la internaciaj rilatoj

de la Poŝto, Telegrafo kaj Telefono.

La Internacia Ligo de Esperantistoj Poŝt- kaj
Telegraf-Oficistoj akceptis en sia 6-a, multnombre
viziita, fakkunsido en Nürnberg rezolucion, post-
ulantan de la Internacia Poŝta kaj Telegrafa Unu-
arĝo, 1-e la akcepton kaj enkondukon de Esper-
anto por iliaj administraciaj interrilatoj, 2-e kiel
telegramlingvon „kjaran“. Tiu ĉi rezolucio, kiel
ankaŭ la propono de kolektado de multnombraj
ĉiulandaj subskriboj, necesaj kiel aldono al la
ĉiulandaj petkriboj farotaj, poste en la 5-a Labor-
kunsido de la XV-a Kongreso de Esperanto estas
unanime kaj apude akceptitaj. Mil paroj da
listoj estas pretigitaj, el kiuj 72 kun po 45 sub-
skriboj estas jam plenigitaj en Nürnberg kaj 928
fordonitaj kaj forsenditaj al la Esperanto societoj,
jurnaloj, ILEPTO- kaj UEA-delegitoj ĉiulandaj,
por baldaŭ plenigadi kun Esperantistaj, kiel
ankaŭ bonaj Esperantemaj aŭ neesperantistaj sub-
skriboj, tute necesaj por nia sukceso. Al la sub-
skribolisto ni aldonis cirkuleron, klarigantan tiun
tre gravan aferon kaj petante zorgeman
respondon de la plenigitaj listoparoj al la ĉi-sube
nomita komisiita iniciinto. Ĝis nun revenis nur
42 plenigitaj listoparoj, inkluzive la 72 suprenom-
itaj, enute 114 plenaj listoparoj kun po 45 linioj,
do entute 4802 duoblast subskriboj.

La Kongreso trege rekomendis la ĉiean sub-
skribigon al ĉiuj Esperantistoj, komitatanoj, fak-
kaj grupo-prezidantoj, redaktoroj, administristoj,
delegitoj kaj societanoj en iliaj landoj kaj urboj.
Nur tiam la venko estos nia. Se necese aldonu
mem iajn samajn pretigitajn listojn, aŭ postulu
novajn ĉe la subskribinto de tiu ĉi cirkulero, ĉar
necesaj aliaj mil paroj estas forsendpretaj. La plimulto
de la ĝis nun ricevitaj subskriboj venas el Ger-
manujo, Nederlando, Svisujo, Ĉeĥoslovakio kaj
Aŭstrio, sed ĉiuj aliaj ŝtatanoj nepre devas
kunlabori kaj same subteni nian gravan agadon
por la oficialigo de Esperanto, unuavice ĉe Poŝto
kaj Telegrafo.

La ĉiulanda nombro de subskriboj estos publik-
gata en la venontaj numeroj de Esperanto Trium-
fonta kaj de Esperanto. Bonvolu do ĉiuj sub-
skribi kaj subskribigi, en ĉiuj, precipe ankaŭ
internacie laborantaj kaj oficistaj randoj. Kun
profunda danko por ĉiu kunlaboro kaj subteno
de nia afero ĉiel certe sukcesonta ni salutas vin
de ĉiuj korege kaj samideane:

Por la Internacia Ligo de Esperantistoj
Poŝt- kaj Telegraf-Oficistoj (ILEPTO):
D-ro Ed. Spielmann, 2-a Viceprezidanto,
P. K. 174, Transio, Bern (Svisujo).

Esperanto bezonata!

Kvara Internacia Kongreso pri Vojoj
en Sevilla (Hispanujo).

Dum raportoj al la graflanda Konsilantaro de
Middlesex, estas dirite, ke la iuta procedaro por
tiu ĉi kongreso estas ne evieble komplikigita per
la lingva malfacileco: la anglaj tradukoj ofte esis
ne perfektaj kaj malfacile kompreneblaj. Ankaŭ
oni ne povis facile sekvi la diskutojn, ĉar la
lingvoj angla, franca kaj hispana estis permesataj
kaj ĉiu parolado bezonis tradukon. Ch. G. S. M.

Edukista Internacio kaj la
Esperantista Instruistaro.

En la Edukista Konferenco okazinta dum la
Nürnberg Kongreso, la Esperantista ĝeinstruistaro
sin reorganizis sur bazo vere pacifista. Kon-
siderinte sian profesion apostolecon, la gravan
priespondecon de ĉiulandaj edukistoj en la
dissemado de malamo inter popoloj en lernejoj,
ĝi akceptis, kiel asocian fundamenton, la Zamen-
hofan idealon: „interna ideo“, unua devo de la
tutmonda edukistaro Esperantista. Tial ĝi akceptis,
kiel oficialan organon, gazeton „Novaj Tempoj“
kaj aliĝis principe al Edukista Internacio.

Multaj Esperantistaj ĝeinstruistoj kredas, ke
gazeto „Novaj Tempoj“ pri popoledukado estas
oficiala organo de Edukista Internacio, tute ne,
ĝi estas memstara Esperantista entrepreno, libera
pedagogia diskutejo, organo celanta praktikan
utiligadon de Esperanto sur eduka kampo. Al-
flanke „Edukista Internacio“ ne estas ia Esper-
antista asocio, sed vasta organizaĵo tutmonda el
progresemaj efektive pacifistaj edukistoj. En ĝi
laboras multaj Esperantistoj, kaj ankaŭ kelkaj
ldistoj. Jam preskaŭ 200 Esperantistaj ĝeinstruistoj
aliĝis individue.

Ĉar la komisiono elektita en Nürnberg jam
ekrilatis kun Edukista Internacio kaj ĉar la Esper-
antista ĝeinstruistaro por finorganizi sin devos
serioze pritrakti la demandon pri definitiva aliĝo,
la helpsekretario de Edukista Internacio uzas la
servon de „Esperanto Triumfonta“ por klare difini
la pedagogian idealon kaj soci-educan pozicion
de E. I.

Deklaracio.

„Edukista Internacio“ volas helpi starigon de pli
bona mondo kaj labori en proletariaro por plibonigado
de la estonico.

Ĝia celo estas do la unuigado trans la landlimoj de
la mondultekoj kaj ties interhelpo por:

- a) Eliri el la malfacilaj edukitofitoj de la sociklasa
mala lernejo racion humanan edukmetodon;
b) Farigi pli bonaj propagandistoj kaj edukistoj;
c) Pli bonigi ilian materialan kaj moralan situacion en
la mondo.

Ĝi intencas krei aktiva n rilatojn inter la diversnaciaj
edukistoj per:

- Interŝanĝo de Korespondadoj,
Porsuadaj vojaĝoj,
Edukistaj kongresoj,
Interŝanĝo de infanoj libertempe,
Praktikado de internacia lingvo,
kaj plej eble baldaŭ per eldonoj de
Internacia bulleto,
Verkoj de pedagogia literaturo, kaj de
Porinfana literaturo.

Konsistoj.

Art. 1. „Edukista Internacio“ kunigas grupon aŭ
grupon, el edukistoj en ĉiu lando — aŭ en landoj, kie
iliaj grupo ne ekzistas, izolitajn edukistojn — kiuj akceptas
la jenajn principojn:

- a) Klasbatalo por emancipado de laboristaro,
b) Lukro kontraŭ imperialismo, milito kaj malamemo
inter la popoloj,
c) Starigo de laŭracia kaj humana lernejo.

Edukista Internacio estas sendependa. Ĝi povas kun-
labori kun ĉiuj individuoj kaj organizaĵoj proletariaj
interesataj pri ĝia agado.

Oficiala lingvo.

Art. 2. La oficiala lingvo de la E. I. estas la naci-
lingvo de la ĝenerala sekretario. Al anoj de E. I. estas
rekomendata la studado de aritarila internacia lingvo.

Devoj de la grupoj kaj izolitoj.

Art. 3. La kotizon de la grupoj oni kalkulas laŭ
tarifo de 1/50 de tagsalajro de oficiala komencanta instruisto
en ĉiu lando — por anoj, jare —
La izolitaj aliĝantoj ne pagas kotizon. Ili devas sub-
skribi aliĝilon.

Esperanto rekomendata! Itala, germana kaj franca
naciĝrupoj voĉdonis la jenan rekomendon: „Al anoj
de E. I. estas rekomendata la internacia lingvo plej
disvastigita, i. e. Esperanto“.

Izoluloj! Sufiĉas, ke vi deklaru ke, leginte la regularon
de Edukista Internacio, ĉar ne ekzistas en via lando
grupo el E. I., vi deziras individue aliĝi. Dokumentojn
kaj propagandilojn vi ricevos senpage.

Internacia sekretarioj: L. Bouet, 15, rue Fardeau,
Saumur (M. a. L.) Francio.

Esperanto-fako: Por informo, aliĝo, propagando,
turnu vin al la helpsekretario:

Marcel Boubou, 96, rue St. Marceau, Orléans
(Loiret) Francio.

Represigo de la ĉi-supra deklaro en naciaj
gazetoj estas petata.

Por malĉaseme informi ĝuste la ĝeinstruistojn
necesintajn en la Nürnberg Kongreso, mi diru, ke la
principan aliĝon al Edukista Internacio proponis
germana asocio ĝeinstruista interkonsentinta kun
francaj Esperantistaj eduk-
istoj. Nur per tia frata kunlaborado de la eduk-
istoj el malmalaj registaroj povas naskiĝi nova
pacama spirito en estontaj generacioj. La Esper-
antista ĝeinstruistaro ne aliĝis definitive al E. I.
kaj havis rezervemon pri kelkaj punktoj de la
deklaro. Al principo de „klasbatalo“ ĝi
preferis „lukton por sociala sciordo“, al vortoj
„proletariaro kaj sindikalismo“, ĝi preferis
„homaron kaj Esperantismon“. La demando pri
paco per ĉiuj rimedoj (ankaŭ per edukado) estas
internacie politika kultura kaj ekonomia. Pacif-
sistoj kaj Esperantistoj ne povas esti neŭtralaj,
sed toleremaj kaj progresemaj. Edukista Inter-
nacio ne estas sektema, sed estas politike kaj
sindikalisme tute sendependa. Esperantista Edu-
kista Konferenco en Nürnberg ankaŭ deziris, ke
Esperanto estu la oficiala lingvo de Edukista
Internacio. Ĝis nun tion ne atingis la Esper-



antistoj laborantaj en E. I. pro kontraŭagado de
kelkaj malmalajoj de Esperanto, sed jam kelkaj
naciaj sekcioj favoris Esperanton kaj definitivajn
sukceson certigos la Esperantistoj mem, se ili
kunlaboros multope en E. I.

La helpsekretario por la Esperanto-fako de
Ed. Int. alvokas ĉiujn Esperantistajn ĝeinstruistojn
senrezerve aprobantaj la ĉi-supran deklaron
sendi sian aliĝon (senpage), kaj proponas, en la
multenombra Esperantista ĝeinstruistaro decidita
principan aliĝon al Edukista Internacio, starigon
de sekcio definitive kaj senrezerve aliĝanta por
ke ampleksigo vere praktika faka uzado de
Esperanto ĉe l' edukistoj per efika kunlaboro
de l' Esperantistoj al la sola multflua kaj espriga
granda organizaĵo de tutmondaj edukistoj.

Marcel Boubou.

Praktiko de Esperanto.

Komence de januaro 1923 en Sofia komencos
aperi semajna ĵurnalo „Svoboda“ (Libero), kiu
krom sia ĉefa tasko: noti kaj pritrakti la ĉiutagajn
okazaĵojn en la bulgara vivo de vicipunkto de
Toistoja instru, donos regule sciigojn pri la
idea kaj spirita vivo en la tuta mondo. Speciala
fako estas destinita por la Esperanto-movado.
Pli poste kaj laŭbe la redakcio de la ĵurnalo
estas preta doni artikolojn aŭ sciigojn pri la
kulturaj movadoj en Bulgario ankaŭ en Esperanto.
Tiu nova ĵurnalo havas do specialan signifon
precipe por la bulgaraj Esperantistoj kaj meritas
ilian vastan subtenon.

Ankaŭ la korespondadon kun siaj eksterlandaj
korespondantoj la redakcio de „Svoboda“ faros
nur en Esperanto, kiucele ĝi akiris la kunlaboron
de Esperantistoj. La redakcio danke ricevos el-
trancĵojn de gazetoj ĝin interesantaj en franca,
angla, germana, rusa kaj Esperanta lingvoj.
Adreso: Redakcio de „Svoboda“, str. 6. Sep-
temvri 1, Sofia, Bulgario.

Esperantistoj en Berlin!

Okaze de la 20 jara datreveno de la fondiĝo
de la Esperanto-Grupo Berlin ni aranĝos la 17-an
de novembro 1923 je 7 1/2 horo en Werner-
Siemens-Realgymnasium, Berlin-Schöneberg,
Hohenstaufenstr. 47/4 festivesperon, kiu samtempe
servos al la propagando. Krom kelkaj el la
fondintoj, parolados D-ro Winsch, kaj oni prezentos
muzikejojn kaj deklamadojn. F-ino Nickel raportos
pri la 20 jara Esperanto historio de Berlin. —
Estas devo de ĉiu samideano en Berlin viziti
tiun ĉi festivesperon. Ĉar pro la nunaj cirkon-
stancoj speciala invito ne estas ebla, ni petas
ĉiujn Esperantistojn de Berlin kaj ĉirkaŭaĵoj ateni-
gi siajn konatojn kaj samideanojn pri nia jubilea
vespero pro multinombra partopreno en ĝi.
Esperanto Grupo Berlin.
H. Nickel.

Parolejo.

Sub tiu ĉi rubriko laŭ disponebla loko estas lojale envenstaj
sciigoj, informoj, kritikoj, liberaj vortoj ktp. La redakcio tamen
ne prenas sur sin iun respondecon pri la enhavo, sed ĝi rezervas al si
la rajton eventuale rifuzi neaĝajn artikolojn.

230. s-ro aŭ s-ro?

La ĝenerala uzo ĉiam inklina al la mallongigo „s-ro“
por „sinjoro“, ĝis kiam antaŭ (mi kredas) proksimume du
jaroj iu s-ano rekomendis en ET, ke oni skribu „s-o“,
ĉar ankaŭ en „s-ino“ ne trovigas la r. Ĉi tiu atentiĝo
unumomente ankaŭ volis logi min, sed tiam pripensis
la rimarkigon kaj restis fidela al la formoj s-ro, d-ro, n-ro
ktp. — La afero ŝajnas esti flanka kaj negrava; sed tamen
ĝi fakte estas la konsekvenco kaj kvintesenco de tre
atendinda demando:

Zamenhof ne starigis regulon pri la dispartigo de
vortoj, kaj tial ĉiuj dispartigas la vortojn (ĉe la fino de
linio) kiel li volas. Laŭ mia opinio ankaŭ ĉi-riate ni
bezonas unuecon, iom-post-iom, kaj ni nin gvidu per la
logiko. La logiko postulas, ke oni faru diferencojn inter

Al hodiaŭa numero estas aldonita:
„Por Distrado“.

Por Distrado.

INTERNE ni mem devas labori kaj provi esti mildaj en nia juĝo, esti pli modestaj en niaj postuloj. Ni devas komenci preni la homojn kiaj ili estas; kaj ĉiam, por plifaciligado de la laboro, pripensi, ke en nordo kaj sudo, okcidento kaj oriento estas ĉiam la sama afero kaj ke ni mem havas mankojn, kiujn ni mal-laudas kaj kondamnas ĉe aliaj.

THEOD. FONTANE.

Du pinarboj.

Originalo de Teo Jung.

(La porprozaĵa premio de IX-aj Internaciaj Floraj Ludoj.)

Ofte mi migras sola tra la mirigaj mirakloj de mia hejmlando. Tiam mi havas specialan plezuron komenci interparolon kun plej diversaj objektoj aŭ lasi ilin rakonti al mi pri ĉiuj specaj interesaj aferoj. Jen mi interparolas kun la majesta riverego, kiu multon vidis dum sia centkilometra kurado kaj scias bone rakonti per la brulado de siaj ondoj; — jen kun la alta arbaro, kies branĉoj kaj folioj susuras kaj murmuris pri idiliaj spektakloj okazintaj sub iliaj rigardoj en la vastaj, verdaj haloj; — jen kun kruta roko, kies rigidecon kaj nudon preterpasis jarcentoj kaj jarmiloj; — jen kun dezerta ruino de antikva kastelo, kiu iam spertis en siaj salonoj galegajn festenojn de diboĉemaj gekavaliroj kaj en siaj turoj suferojn kaj turmentojn de malfeliĉaj kapitoj; — jen kun profunda abismo, en kiu iam loĝaĉis furioza monstro malfrankviliganta la ĉirkaŭajn kampojn kaj vilaĝojn; — jen kun krucbildo staranta solece apud vojforko; — kaj kun multaj, multaj aliaj diversspecaj objektoj.

Kelkajn povus enuigi tiaj solecaj migradoj kaj tiaj stranganj interparoladoj kun ŝajne senvivaj objektoj. Sed mi komprenas la lingvon de la objektoj, kun kiuj mi parolas. Ne por ĉiu ĝi estas komprenebla. Oni devas esti naskita, vivinta inter ili kaj kun ili. Kaj por tiu komprenanto ilia lingvo sonas dolĉe, rave, mirige — kiel kanto, altsfera, nobliga muziko.

Lufoje mi renkontis sur altaĵo du solece starantajn pinarbojn. Estis somera tago, kaj la tagmeza suno brulis faires de ĝi zenito. Benko staris je iliaj piedoj; sed ili jam ne jetis ombron. Iliaj branĉoj estis nudaj, sen pingloj, kaj malgaje distenditaj sin, kiel la manoj de malsatanto sin etendas malgrase, skelete por peji paneron.

Tamen mi sidigis min sur la benkon, ĉar mi ĵus faris longan marŝon kaj estis laca. La vizaĝon mi kovris per la manoj, fermis la okulojn, kaj — mi ne scias, ĉu mi ekdormis aŭ restis sendorma — subite mi havis la senton, kvazaŭ iu alparolis min.

Certe tio estis la pinarboj, aŭ unu de ili, kiu havis por rakonti iun interesan historion. Mi

streĉis la orelojn kaj ekaŭdis neniam antaŭe aŭditan muzikon, kvazaŭ sonaraj voĉoj tenora kaj alda, akompanataj de mallaŭtaj akordoj, kantas harmonian dueton, jen solvoĉe alterne en kortuŝa melodio, jen duvoĉe kune en ravaj kunsonoj.

Komence trankvile, egalmezure, rakonte:

Estis du bonaj najbaraj infanoj: Petro kaj Miri. Ili vivis en la sama vilaĝo. En tiu vilaĝo, kiu je distanco de dudek minutoj kuŝas pace inter la riverego kaj la montaro. Ili estis la ĝojo kaj feliĉo de siaj gepatroj. Ili havis la saman aĝon. Ili iris kune lernejon. Ili ludis kune. Ili disputis kune kaj ree ludis. „Lnu koro kaj unu animo.“

Iom pli viva fariĝis la melodio, kaj nuanceton malgaja.

Venis lia dekkvara jaro. Liaj gepatroj forsendis lin urbon, por ke li lernu bonan metion. La knabino restis hejme por helpi sian patrinon en la mastrumado. La adiaĵo estis doloriga, sed ne tro.

La melodio fariĝis vivega.

Revenis la knabo. Alstarata li fariĝis, energiaj liaj vizaĝtraĵoj, fajra lia okulo, kuraĝa lia koro. Ruĝiĝis la knabino, kiam ŝi revidis lin. Ankaŭ ŝi ŝanĝiĝis. Beltalia ŝi nun estis, vizaĝo ŝi havis — pentrandin, la peza hararo estis aranĝita kvazaŭ krono super ŝia kapo. Ŝia apero estis kiel la apero de ĉi la matruĝino, ĉarma kaj ravanta. Li premis kore la manon de la virgulino, kisis ĝin, — eĉ pli, li premis ŝian graciajn korpon kontraŭ sia brusto, volis en unu petola ekkuraĝiĝo kisi ŝian dolĉan ruĝan buŝon; sed ŝi deturnis sin, liberigis sin el lia ĉirkaŭpreno, forkuris kaj restis nevidebla por kelka tempo.

Moliĝis la melodio. Trementaj tonoj plenas je sopiro kaj emocio miksiĝis en ĝin. La eterna kanto de amo kaj feliĉo.

Petro, la junulo, fariĝis taŭga subtenanto de sia familio. Sed dum la laboro li ne forgesis Miri, la filinon de l' najbaro. Kial ŝi kaŝas sin de li? Ĉu ŝi ne plu ŝatas lin? Ĉu li dedece kondutis je ŝi? — Samtempe Miri en sia trankvila hejmo senĉese pensis pri li, pri lia forta sed, ho, tiel feliĉiga ĉirkaŭpreno; sopiris je li, je lia kiso, kiun ŝi rifuzis. Kion li pensas pri ŝia rifuzo? Ĉu li ofendiĝis? — Venis kermeso. Jen en d'ncejo ili revidis unu la alian. Kiel aminda ŝi aspektas en sia nova festa robo! Por li ŝi omamis sin. Por li! Estis ŝia unua bato. Hej, kiel ili ambaŭ dance rondflugas tra l' salono! La plej bela paro, por Dio! Post la bato li akompanis sin hejmen. Kiel ofte li faris tion antaŭ jaroj! Sed hodiaŭ li akompanis sin kun tute aliaj sentoj ol tiam. Li sciis, ke li akompanas fianĉinon. Antaŭ la pordo de ŝia hejmo li prenis ŝian kapeton inter siajn manojn kaj premis varmeĝan, longan, senfine intiman kison sur ŝiajn dolĉajn lipojn, kaj volonte ŝi lasis fari lin. — Allan tago ili kune migris sur la altaĵon kaj sidadis sur la benko sub la du pinarboj, ĝuste tie, kie nun sidas —

La kanto fortiĝis. Belegaj tonoj de ĝojo kaj jubilo kondukis la melodion.

De l' alta ĉielo gaje ridis la suno. Trilis alaŭdoj en blua aero. Kaj sur la benko sidis la geamantoj, nesciantie kion komenci por ĝojo kaj alta ĝuego. Subite —

Ankoraŭ plifortiĝis la kanto. Plei altan gradon de homa ĝoĝo kaj surtera ĝuego resonis la melodio. Sed kordo tro forte streĉita ŝiriĝas. Mistono! Ekblovas vento tra branĉaro. Defalas pingloj-folioj. Ploras anĝeloj.

Li tenis sin en siaj brakoj. Ŝi estis senkonscia, pala; siaj okuloj fermiĝis; ŝia hararo malligita, ŝia vestaĵo malordita. Kiam okulojn ŝi malfermis, estis en ili legelaj senmezura malgajeĉo kaj timemo sed ankaŭ silenta dankesporo. Kaj lacega ŝi lasis sin hejmen konduki — kaj ploris.

Dume mi skizos iomete la malfeliĉan vivadon de nia senmorta „Princo de la hispana genio“ por ke la Esperantistoj ĉiulandaj sciu ke ankaŭ en Hispanujo naskiĝis genioj, ĉar ordinare oni povas kredi, ke en nia lando nur vivadis barbaroj, krimuloj kaj toreadoroj.

Dum multaj jaroj, oni diskutadis inter la historiistoj pri la loko de la naskiĝo de Cervantes, ĉar aliĝis al si ilin gloron sep diversaj urboj. Fine oni konstatis, ke li naskiĝis en la urbo Alcalá (elparolu Alcalá) de Henares dum la jaro 1547, kvankam oni ignoradas, en kiu monato kaj tago.

Nur oni scias, ke li estis baptata la 9. oktobro de tiu jaro.

Liaj genajtoj estis s-o Rodrigo de Cervantes kaj s-ino Leonor de Cortinas, loĝantaj en Alcalá dum la epoko de la naskiĝo de Miguel kiu estis la kvara filo. — En la parolaj libroj de la preĝejo S-ta Mario de tiu urbo oni trovis la veran bapton enskribaĵon de Cervantes, kies teksto estas la jena: „En dimanĉo, naŭa tago de la monato oktobro, jaro de la sinjoro 1547, estas baptita Miguel, filo de Rodrigo de Cervantes kaj de s-ino Leonor; lia baptopatro estis s-o Johano Pedro; baptilis lin la parohestro de Nia Sinjorino s-o Serrano; alestano s-o Baltasar Vázquez, preĝeja servisto kaj mi, kiu baptilis lin kaj subskribas. La Abituero, Serrano.“ Oni scias mal multe pri liaj infanaj jaroj, sed nedubeble estas, ke naskiĝinte en Alcalá li multe urbo ricevis la unuajn lecionojn kaj edukadon.

Liaj biografistoj multe verkadis pri ĉi tiu periodo de lia vivo, sed oni ne povas scii kiu el ili skribis la veron. El ĉio ĉi nur oni deduktis, ke Cervantes estis de siaj plej infanaj jaroj tre studema; li havis tre grandan spriton kaj inklinojn por la legado; li kutimis legi eĉ la disrompitajn paperojn, kiujn li trovis sur la stratoj, kaj ankaŭ li ŝatis multe la komediojn kaj la poezion. — Dum la jaro 1564 Cervantes transloĝiĝis kun sia familio al Sevilla. — En tiu ĉi urbo estis kolegio fondita de la jezuitoj en la jaro 1554. Tie studadis la filoj de la familioj plej nobelaj de la urbo. — Ankaŭ Cervantes evenis en tiun kolezion por partopreni kelkajn kursojn pri latina lingvo ĝis la jaro 1567, dum kiu li denove transloĝiĝis al Madrido kune kun sia familio. Ĉi tie li partoprenis la lecionojn de la Majstro s-o Francisco Bajo kaj poste tiujn de s-o Johano López de Hoyos, kiu en siaj libroj nomas nin Cervantes „mia kara kaj amata disĉiplo“.

Oni ne scias certe, en kiu Universitato li studadis, ĉar dum kelkaj el liaj biografistoj certigas, ke li studadis en la Universitato de Sataamanca, aliaj certigas, ke li tion faris en tiu de Madrido.

Luĝante laŭ la specialaj kondiĉoj de lia multkvalta karaktero, li inklino al la literaturo kaj lia granda spirito, malŝarĝita ĉio el la eksterordinaraj cirkonstancoj de lia malfeliĉa vivo, oni ekkomprenas, ke li bezonis nek studadi en la Universitato, nek daktiri la apartajn lecionojn de siaj profesoroj por klarigi kontentige la maloftajn de sia talento. Li penege sin donis je la legado de ĉiuj libroj latinaj, kastilaj kaj italiaj, ne submetiĝante al la instruado

Akra eksono de trumpetoj. Obtuza tondrado de tamburoj akompanas la daŭron de l' kanto vivega.

Milito! Bataliri devas fortaj junuloj. Patrujon defendi. Hejmon protekti. — Ree ili sidas sur la benko. Trankviligu, kara Miri! Ne ploru! Post tri monatoj mi revenos — heroo! Tiam ni edziĝos, kaj neniuj rajtoj insulti vini! Adiaŭ, karulino, preĝu por mi!

Fanfaroj! Sonorilado! La kanto denove fariĝas ĝoia, fairega, entuziasmigra; sed kunsonas malbonaj antaŭsentoj.

Venko! Venko! anoncas la telegrafo. Venko! Venko! sciigas la leteroj de l' soldato. Brilas okuloj de knabino pro fiero, sed vualo de larmoj ofte malklarigas ŝian rigardon. Antaŭ la kruĉiklison ŝi genuas, manojn ŝi etendas al la Savinto, preĝante: Per la graco de viaj sanktaj vundoj savu, ho Dio, la amatojn! — Intertempe pasas la monatoj. Milito ne ĉesas. La amato ne revenas.

Eksploto! Terurego! Kaj — monofona sonorado de mortsonorileto.

Miri tenas telegramon en mano. Tremas pro ekscito. De li, ho, de li! Ses semajnoj ŝi atendis — nenia vivosigno. Nun la telegramo. Si distaldas ĝin, legas — Ekkrio! „Li mortis la morton de heroo.“

Malgajega fariĝas la melodio. Sed subite furiozaj ruliĝoj. Frenezaj sonsaltoj. Kaj finfine — mortsilentado.

La mondo enfalas super Miri. Perdita la koramato! Perdita la honoro! Kion diros la gepatroj, la najbaroj, la tuta vilaĝo? Sur altaĵon sin trenas Miri, trenas kun ŝi sian mortevunditan koron, trenas kun ŝi sian nenaskitan infanon; faligas sin sur la benkon apud la du pinarboj, kie ŝi perdis sian senkulpeccon. Frenezaj atakas, ponardon ŝi iras el faldoj de sia bluzo, ŝtelhulan, fulmbrilan, akran ponardon — Oni enteriĝis ŝin sur la sama loko. Krucon oni ne starigis por ŝi, ĉar ŝi estis pekulinio-memmortiginto. Jam neniuj postsignoj supozigus tombon. Por funebro pri lia malĝoia homo sorta la du pinarboj perdis la reston de sia pinglaro-foliaro.

Ĉu mi dormis? Ĉu maldorme mi sonĝis? Mi ne scias. Metis la manojn for de l' vizaĝo, levis la okulojn, ĉirkaŭrigardis.

Silentado proksime kaj malproksime. Morta silentado. Sufokiga iagmeza atmosfero.

Malrapide mi levigis, serĉis du krudajn bastonojn kaj fiksis ilin krucforme en la teron inter la du pinarboj.

Kiaj ili estas . . .

De majoro Gh. Braescu*.)

Sur la sunardata kampo Lefterie²) en frua mateno la viroj³) saltas kiel lokustoj, sin kuŝigas kaj sin levas, sin levas kaj sin kuŝigas refoje, senĉese, senfine, — neniam „kiel la fulmo“, kiel postulas la malgranda serĝento, eta kiel korko, kun ĉapo partikolera⁴), kiu je signo fafla sorĉe kiel en fabelo kvazaŭ malaperigas ilin en la teron.

- „Ĉu vi ne volas labori, kamerado?“
- „Vivu⁵), sior⁶) serĝento . . .“
- „Ĉu vi ne volas, he?“
- „Vivu, sior . . .“
- „Ĉu vi tute ne volas?“
- „Vivu . . .“

kaj disciplinaj akademiejoj, formante per si mem sian ĉarman literaturon.

Li estis nekoniata genio, alnomo, kiun oni aliĝis ankaŭ al verkistoj tiel famaj kiel la Markizo de Sautillana, Hurtado de Mendoza, Rodrigo Méndez de Solís kaj multaj aliaj, kiujn, kvankam ili ne havis studojn kaj diplomojn universitatajn, tio ne malhelpis por atingi la plej perfektajn konojn kaj aŭtoritatecon en la literaturo kaj en aliaj sciencoj. — De l' jaro 1668, en kiu Cervantes jam estis 21-jara, oni komencas scii konkrete liajn agojn.

Tiun jaron li verkis poezion dediĉitan al la morto de S-ta Regina Moŝto Isabela de Valois, edzino de Filipo II., okazinta en tiu sama jaro. Oni publikigis tiun poezion kune kun la historioj verkita de s-o Hoyos pri la morto de la reĝino.

Dum la monato decembro de tiu jaro eniris Cervantes en la servadon de la Kardinalo Julio Acquaviva, kiu estis veninta en Hispanujon je la nomo de lia Papa Moŝto Pio V. por esorimi al la hispana reĝo sian bedaŭron pro la morto de la reĝino.

Oni supozas, ke la Kardinalo Espinosa parolis al la Kardinalo Acquaviva pri la specialaj inklinoj de Cervantes, kaj la kardinalo itala, verko kiu ŝatis multe la literaturo kaj proiekti la junajn verkistojn kaj artistojn decidis akcepti la novan verkiston kiel servanton. Je la fino de l' jaro 1668 foriris al Italujo la kardinalo kaj lia sekvantaro, kaj kompreneble ankaŭ Cervantes; li vojaĝis tra Valencio, Tarragona, Barcelona, Francujo, la Alpoj, kaj fine ili eniris en Romo en la komenco de 1669, kie nia verkisto povis admiri la belajn verkojn de la Eterna Urbo. — Malmulte da tempo li restis en la servado de la kardinalo, ĉar en tiu jaro mem Cervantes eniris kiel soldato en la korpuson de la generalo Miguel de Moncada.

Kune kun tiu ĉi korpuso, li vizitis la koron de Italujo, de Roma ĝis Ancona, Ferraro kaj Venezia. — Dum tiu ĉi vojaĝo tra Italujo li fortikiĝis sian spriton rigardante la artajn trezorojn, la majstrajn verkojn de la klasika literaturo kaj tiujn de la Renesanco, kaj samtempe li vidis la naturajn belajn de la regiono plej fruktodona en Eŭropo. — Eble dum tiu epoko, liaj talento natura kaj mireginda memoro, aranĝis la planon de siaj plej belaj verkoj.

Dum kelka tempo, li estis en Genova kaj Napoli en la jaro 1671 kaj tiu poste li enŝipiĝis en la ŝipon „Markizino“ por partopreni la militon kontraŭ Turkujo. — La 15. septembro eliris el la haveno de Messina la kristana militŝiparo, kiu konsistis el 300 militŝipoj hispanaj, pontifikaj, veneziaj kaj genovaj, kaj 50.000 soldatoj. Ĉiuj sub la ordono de lia Princa Moŝto Johano de Aŭstrio, frato de Filipo II., por kontraŭbatali la imedindajn militŝiparon turkan, kiu minacadas turan Eŭropon.

La 7. oktobro 1671 la kristana militŝiparo atakis la turkan sur la golfo de Lepanto precize tiam, kiam Cervantes estis malsana.

Lia kapitano kaj lia kamaradoj, kiuj vidis lin en tiaj kondiĉoj, konsilis lin, ke li ne partoprenu la batalon; sed li diris al sia kapitano: „Mi pli deziras morti,

Cervantes kaj Shakespeare.

Kiu studadis la historion, tiu certe sentas grandan admiron pri kelkaj el ĝiaj periodoj, sed certe li eksperimentas grandegan entuziasmon pro la kolosa laboro efektivigita de la homaro ĉe la komenco de la Moderna Epoko.

En tiu tempo ĉio sin manifestadas granda; brilas en la plej granda famo la literaturo, la belartoj, la scienco, la armeoj kaj la politiko; Colombo trovis Novan Mondon; Kopernikus kaj Kepler difinas la leĝojn de la astroj; Miguel Servet malkaŝas ke la sango cirkuladas senĉese tra nia organismo; la matematika analizo estas perfektigata de Harriot; la laboroj de Galilei permesas atingi la mezuradojn de la astrovojoj de la planedoj kaj difini la ekvilibron de la korpoj, ĉar la teleskopo elpensita de li taŭgas perfektege por zorge ekzameni la senfinan spacon kaj por eltrovi la senĉesan movadon de la korpoj tra la grandegeco de la Universo.

Artistoj kiel Leonardo da Vinci, Michel Angelo kaj Raffaello, reĝoj kiel Leono X., Karolo V., Francisko I. kaj Henriko VIII, revolucias la mondon, igas ŝanĝi ĉion al la progresado en la Belartoj kaj en la organizado de la novaj nacioj kiuj atingas sian plenan disvolvigon, finigante la ruĝinojn de la Mezepoko. — Ĉie oni laboradas. La batalado atingas en la diversaj fakoj kolosalajn proporciojn, kaj ĉi tiu senĉesa batalado naskigas civilizojn, kiu ŝanĝas la morojn en la tuta mondo, kaj kiu restos kiel glora rememoro por la estontaj generacioj. — La Belartoj atingas sian plej grandan disvolvigon, kaj la klasika teatro venkas post grandega batalo la mezepokajn scenajn prezentadojn.

La literaturo, helpata de la presarto, mireginda elpenso de Gutenberg, eksterordinare helpas la formadon de tiu granda civilizacio, luma radio de la homaro.

El la popoloj latinaj kaj germanaj eliras ĉiumomente homoj senmortaj, saĝuloj, artistoj kaj poetoj. — En Hispanujo kaj Germanujo, en Francujo kaj Anglujo, en Italujo kaj Portugalujo naskiĝas genioj, kaj la deksepa jarcento kaj komenco de la deksepa montras la Oran Aĝon de la eŭropaj popoloj. Antaŭ 307 jaroj mortis du homoj, genioj eksterordinaraj el tiu tempo. — La 28. aprilo de l' jaro 1616 ĝuste en la sama jaro, kaj eble en la sama horo, mortis Cervantes, la neimlebla nobleverkisto hispana kaj Ŝi-akespeare, la genia dramaturgo angla. Ĝi estas dato, kiu oni ne devas forgesi, kaj oni kondukis ĝuste, ĉar tiuj genioj glorigis siajn respektivajn landojn, kvankam iliaj samtempuloj ne estimis iliajn grandajn meritojn. Tamen la p-stelularo estimis tiujn meritojn en ilia justa estimindeco, kaj en Hispanujo oni pensis aranĝi je honoro de Cervantes gravajn festojn por inde solenigi la 3-an jarcenton de lia morto. Ĉi tiuj festoj estis prokrastataj pro la terura milito, kiu premeĝis la homaron, ĝis kiam denove regus pace.

„Kial do vi ne volas labori?“
 „Diru do, kial vi ne volas labori?“
 „Vivu...“
 „Vi, ĉu vi volas labori?“
 „Mi volas...“
 „Laboru do, *kamerado!*“
 „Mi laboros...“
 „Laboru do, vi *kamerado*, ĉar se vi ne laboros, iru en la...“, li finis mallaŭte, per la okuloj sekvante la tledoplenajn paŝojn de la oficiro.

Mi foriris. Sed kiam nelonge antaŭ tagmanĝo la tramo denove min portis al la ponto *Ileferie*, mi preterpasis grupon da viroj haltantaj surstrate, la ĉapron sur la nuko, kun vizaĝoj brulantaj kaj surroŝitaj de varmeĝo.

„Pro kio vi ne kantas?“
 „Vivu, *sior* serĝento...“
 „Pro kio, vi, *kamerado*...?“
 „Vivu, *sior*...“
 „Diru do, vi *kamerado*, kial vi ne volas kanti?“
 „Vivu...“
 „Vi, ĉu vi volas kanti?“
 „...“
 „Ĉu vi volas aŭ ne volas?“

„Sinjoro serĝento, pardonu min, eble la viro estas malsana,“ mi enmiksitis min en la fremdan „poton“, rekonite miajn matenajn kompatindulojn. Sed mi ne havis tempon, bone priatenti la respondon, kiu en la najbareco de la preĝejo de *St. Eleferie* ricevis kvazaŭ fortan odoron de inzenso. Juna oficiro, malkvieta, knabo almeta, maldiketa, kun bukloj nigraj kaj okuloj samkoloraj, razita kaj pudrita kiel decas, kiun mi ofte renkontis sur la ekstera starloko de l'ramo kaj kiu laŭŝajne komandis la trupon, demandis lin, malrapide alpaŝante, milde kiel frato:

„Kio estas al vi, Voinea? Ĉu vi estas malsana, ĉu io vin doloras?“

„Ne, vivu *sior* subletinanto, mi ne estas malsana,“ respondis sensive la soldato, rigardante en la okulojn de l'oficiro. „Venis vespere homo el mia vilaĝo por min sciigi, ke mŝtris mia patrino.“

„Ho, kia malfeliĉo!“ diris la oficiro kortuŝite, kun gesto de kompato. Poste, paŝinte pli proksimen, li metis la manon sur lian ŝultron kaj demandis lin amike: „Vi estas el Romanati, ĉu ne? Ankaŭ mi ne havas patrinojn. Kiam vi povos veturi? Ĉu vi havas monon? ... Vi ne havas? — Nu, prenenu tiun *pol-on*“... li daŭrigis, post multklopoda traserĉado de la poŝoj, elfosinte laŭvice malnovan leteron, makulitajn fotojn kaj kelkajn rompiĝintajn cigarojn. — „Vi havos ok tagojn da forpemeso, mi raportos. Ĉu hodiaŭ estas merkredo?“

„Vendredo!“ rapidis ĝustigi la serĝento, salutante mallonge, kunbatante la kalkanojn.

„Jaŭdo, jaŭdo! Hodiaŭ estas jaŭdo!“ asertis konkure la viroj, ridante pri la eraro de l'gradulo.

„Silentu! Vendredon, tio estas unu semajnon deponi morgaŭ, rec prezentu vin por servo. Komprene? —“

„Vivu, *sior* subletinanto,“ ‚sigelis‘ la soldato.
 „Viroj en kazernon, per ordinara paŝo, sen ŝtonto!“

Kaj la oficiro ekiris kun la manoj en la poŝoj, tenante la glavon ĉe la kapo, la cigaron en la angulo de l'buŝo.

Mi manĝis lin per la okuloj, direktante min al la hejmo, du-tri paŝojn post li. Disiĝonte ĉe la angulo, en la direkto de l'drinkejo „Al la ĉasisto“ (bilde reprezentita per infanteriano, kun okuloj rigidaj pro teruro, staranta super la pordo kontraŭ husaro, kun manoj tro mallongaj), la servisto oficiro kuris renkonte al sia mastro kaj, irante apud li, afiliktite kriis en lian oreolon konfidence: „La lavistino ne volis eliveri la tolaĵojn; ŝi diris, ke ni antaŭe donu la monon. Ĉu vi aŭdas?“

Kun afabla permeso de la aŭtoro el la rumana originalo tradukis *Tiberio Morariu*, Bucureŝti.

*) Majoro Gheorghe Braescu estas eminenta rumana verkisto nuntempa, aŭtoro de popularaj rakontoj el la soldata vivo.

1) Vulgara prononco de l' nomo Eleferie.
 2) Viroj = soldatoj
 3) Partikulara, t. e. aĉetita per propra mono.
 4) „Vivu“ estis la laŭregula komencvorto ĉe la raportoj en la rumana armeo.
 5) „Pol“ = vulgara nomo de banknoto de 20 leoj.

Terurajoj.

(Humoroja.)

Ĉe la komenco ekzistis Nenio
 (Se estas eble, ke estis komenco);
 Forestis Dio, ĉar forestis Mio,
 Kaj ĉe l'komenco ekzistis Nenio.
 Kaj el mallumo, sen flanka intenco,
 Aperis la Komenco Scienco...
 Sed, se komencon pruvas nur Nenio,
 Ĉu estas eble, ke estis komenco?

Neniam estis komenco de l'mondo,
 Neniam ankaŭ forestis Spirito...
 Tamen teruras — dem-ndo, respondo.
 Ĉu estis iam komenco de l'mondo?
 Kaj penso dronas en malvarma ŝvito.
 Ŝvebante inter siaj os orbito,
 Ĉar ja neblas komenco de l'mondo
 Kaj la foresto de Dia Spirito.

Malsaĝe estas pri aĵoj saĝaj
 Pensi kaj perdi apetiton tute —
 Ĉar la rezultoj estas tro sovaĝaj
 Malsaĝas pensi pri aĵoj tro saĝaj.

A. Kalina.

Tri vortoj!

Kiam hodiaŭ vi venis al mi,
 Min feliĉigis tri vortoj de vi,
 Kiujn vi diris afable,
 Kiuj al mi sonoris agrable.

De tiam lasis min tuta kviet'.
 Ho de tri vortoj la sankta sekret'.
 Kiujn vi diris afable,
 Kiuj al mi sonoris agrable!

Otto Bonte.

La barbiro de la „Beauce“ en la pasinta tempo.

La hodiaŭaj barbiroj agas laŭ la modo; ili sapumas la vizaĝon de la kliento per peniko kaj sapopulvoro; sed antaŭe, dum la tempo de niaj avoj, ili ne estis tiel zorgemaj. Kiel pruvo ĵen estas la aventuro okazinta al vojaĝanto trapasanta nian vilaĝon antaŭ proksimume duona jarcento.

Bezonante razigi sian barbon, li demandas sian gastigiston, kie estas la butikoj de la barbiro. Oni montras al li la domon kontraŭe lokitan, ĉe la ŝuisto.

Li eniras, sidigas kaj, kun tualetotuko ĉirkaŭ la kolo, atendas la bonvolon de la barbiro.

Tiu ĉi, starante malantaŭ la seĝo, tenas per la maldekstra mano la razilon kaj per la dekstra pecegon da ŝapo de „Marseille“, per kiu li frotegas la vangojn de la kliento.

De tempo al tempo la barbiro ĉesas frotadi, sin deturnas, kraĉas kaj repasigas la sapon sur la vizaĝo. Mirigite pro tiu malestetikaĵo la vojaĝanto diras al la barbiro: „Kial vi konstante kraĉas? Ĉu vi estas malsana?“

„Ne, feliĉe, kara sinjoro, mi fartas bone: mi kraĉas sur la sapon, por fari ŝaŭmon.“

!!!
 Kaj li diras plue: „Ĉar — vere — kun vi, sinjoro, kiu estas fremda, mi ne kuragaĝas agi kiel kun miaj dimitaj klientoj?“

„Ha! Kiel do vi agas kun viaj klientoj?“
 „Mi kraĉas rekte sur ilian vizaĝon!“

!!! — —

Tradukis el franca lingvo *Paul Corbaon*.

Humoro.

Trafa respondo.

Unu episkopo, ekzamenante seminarianon, estis treege mirigita, kiam la lasta deklaris, ke li tute ne kredas je la mirakloj. La episkopo decidis doni al la seminariano ekzemplon, kiu povus lin tuj kredigi.

„Imagu,“ diris li, „ke mi supreniris altan sonorilejon kaj falis de tie, sed tamen restis viva. Ĉu tio ne estas miraklo?“

„Ho, laŭ mi, tio estas hazardo.“

„Nu, bone, estu tiel. Sed imagu, ke mi supreniris la sonorilejon duan fojon kaj denove falinte de tie, mi tamen ne mortis. Ĉu tio ne estas jam efektiva miraklo?“

„Ne. Via episkopa moŝto evidente estas speciale feliĉa.“

„Estu tiel. Sed mi denove por tria fojo supreniris la sonorilejon kaj denove falinte de tie restis viva. Do, fine, ĉu vi ne kredas, ke tio ĉi estis vera miraklo?“

„Kial miraklo? La afero klariĝas tre simple. Via moŝto jam kutimis fali?!“ *Georgo N. Teterin*.

batalante por mia Dio kaj mia patrujo, el mian sanon, kaj mi deziras star sur la kio plej danĝera.“ Li tion atingis kaj batalis heroe. Post tiu terura batalo, en kiu la turka militŝiparo estis plene disigata kaj venkata, oni alkondukis en la ĉefstacion de Messina la heroon Cervantes, ĉar li havis du glavajn vundojn sur sia brusto kaj alian vundon sur la maldekstra mano, kiu restis malutila por ĉiam.

Tial oni nomas lin enkaŭ per la nomo „La manmankulo de Lepanto“. Pro la eksterordinara konduto de Cervantes oni proponis al la reĝo nomi lin kapitano, sed li restis atingis la efektivejon de tiu ofico. En la hospitalo de Messina li restis ĝis la monato marto de la sekvanta jaro, kaj kiam li estis tute resanigita, li denove eniris en la armeon la 29. aprilo. En la monato oktobro li partoprenis la batalon de Navarino. Poste li vojaĝis denove tra Italujo vizitante la ĉefajn italiajn urbojn, preĉipe Napoli, kiun li kutimis nomi: „mia tre kara urbo“. — Pli malfrue li enkaŭ partoprenis la militojn kontraŭ la afrikaj urboj Tunizo kaj La Golato; tie la kristanoj ne povis venki la afrikanojn kaj Cervantes retris en Italujon, kie li restis ĝis 1575. Tiam li petis permeson por reveni en Hispanujon, kion li baldaŭ atingis. — Li ensipiĝis kune kun sia frato Rodrigo en la fregaton „Luno“ kaj ili eniris en la haveno de Napoli la 20. septembro al Hispanujo, sed la 26. apud Marselle ili trovis kelkajn algeriajn korsarajn ŝipojn, kaj post malgranda batalo ili estis kaptitaj kaj alkoncuktaj ĝis Algerio, kie ili restis malliberigitaj kvin longajn jarojn.

Cervantes kunportis kelkajn leterojn skribitajn de la generalestro por la Reĝo Filipo II., kaj kiam la marabistoj prenis tiujn leterojn, ili konvinkigis ke Cervantes ne estas ordinara soldato kaj ili konservis lin en la espero, ke li ricevos bonegan reakteton.

Kelkajn fojojn li aranĝis ribelatojn inter la kaptitoj por liberigi de siaj brutimilajj karcerestroj, sed por diversaĵ kaŭzoj ĉiam malprospiris tiuj intencoj.

Inter la diversaĵj malamikoj de Cervantes, kiuj eniris lian genion kaj maldroigis lian vivon, estis preĉipe servicio de la algeria reĝo nomia Johano Blanco de Paz, kiu havis grandan influon en la malfeliĉoj de Cervantes, dum ĉi tiu restis en Afriko.

Tie unu el tiuj fojoj, en kiuj Cervantes kune kun 6 kristanoj estis preta liberigi, kaj granda fregato atendadis liin sur la haveno, Blanco de Paz, kiu havis afrikan senĝon, denuncis tiun projekton al la reĝo de Algerio; anue per sklavo, kiu kelkajn fojojn parolis kun li, kaj poste, li mem, kiam la reĝo provis de li klarigon pri tiu projekto. Ĉiuj kristanoj fimadis la punon de la reĝo, sed Cervantes petis por si mem la tutan respondecon.

Pro la malkovro de tiuj ribelatoj, li neniam ricevis punon, ĉar lia mastro ĉiam distingis lin inter la aliaj kaptitoj; eble Cervantes atingis inspiri al li ian neklarigeblen senĝon, tial ke parolante kelkajn fojojn inter la aliaj estroj, la mastro de Miguel diris: „Dum mi posedos tiun malmankan hispanon, mi fimas nek pri la malliberaj kristanoj, nek pri miaj ŝipoj.“

Krom tio, la vivo en tiu malliberejo estis por Cervantes tre kruela kaj li sopiradis la liberecon. — Fine inter la familio de Cervantes kaj kelkaj religuloj oni sukcesis kolekti 8000 realojn, monsumo postulita de la lasta mastro de Miguel por liberigi lin, kio okazis la 19. septembro 1580. — Reveninte en Hispanujon li deziris paroli kun la reĝo hispana pri la marabistoj de Algerio, kiujn li deziris ekstermi, sed la korteganoj ne volis aŭskulti liajn proponojn, kaj li forlasis la projekton. Serĉante novan oficon li denove eniris en la armeon kaj partoprenis la militon kontraŭ Portugalujo, sed baldaŭ li forlasis la armeon por sin okupi je la verkado de komedioj kaj literaturaj.

La 12. decembro 1584 li edziĝis kun s-ino Catalina Palacios Salazar el familio nobela sed tiel malriĉa, kiel tiu de Cervantes.

Por subteni la novan vivadon ne sufiĉis la verkado de komedioj, kaj li atingis oficon en la ĝenerala komissitaro de impostoj, kie li restis kelkajn jarojn, sed pro malapero de iaj monsumoj li estis kelkan tempon en la malliberejo de Sevilla kaj poste en tiu de Argamasilla de Alba. — Oni supozes ke dum sia restado en la malliberejoj li komencis la verkadon de sia plej bona verko „La Sprita Junkro Don Quixote de la Mancha“, ĉar liaj malriĉeco kaj malfeliĉoj eble inspiradis al li tiun miregindan historion.

La unua parto de D. Quixote eliris publike dum la jaro 1604, kiam li estis preskaŭ en granda mizero en la urbo Toledo.

La sekvantan jaron li estis devigata iri al Valladolid, kie estis la kortego, por klarigi en la juĝejo pri la malapero de la mono. Klariginte la aferon, oni sciis ke Cervantes ne estis kulpa pri tiu malapero, kaj li restis libera en Valladolid.

Tie li loĝis kelkajn jarojn en domo tre malgranda inter la drinkejoj de la antaŭurboj.

Lia familio konsistis el kvin virinoj; nome lia edzino, lia filino, lia fratino, lia nevino kaj unu servistino.

Tiuj ĉi virinoj laboradis senĉese per la kudriloj por subteni sian mizeran vivadon, dum Cervantes verkis la duan parton de „D. Quixote“ kaj kelkajn aliajn verkojn, inter ili „La Modelaj Noveloj“. En tiuj eksterordinaraj kondiĉoj vivadis la plej granda hispana genio, kiam li verkis tiun historion, kiu post tri jarcentoj ne perdis la meriton kaj ankoraŭ piezurigas la civilizitan mondon. Por ke oni sciigu pri la aŭtismo de tiu fama verko, mi sciligas al vi, ke post la Biblio, la verko, kiu atingis pli da eldonoj estas la „Sprita Junkro D. Quixote“ kaj ĉi estas la jenaj: 710 hispanaj, 163 francaj, 200 anglaj, 84 portugaliaj, 96 italiaj, 80 germanaj, 5 rusaj, 4 grekaj, 5 polaj, 6 danaj, 15 svedaj, 2 latinaj, 1 kataluna, 1 turka, 1 hebrea, 1 japana kaj... kiam ni havos plenan Esperantan eldonon?*)

*) Antaŭ la milito aperis tradukoj el tiu semorta ĉefverko en la konata serio de E. B. li, havbitaj de Ellersiek & Borel, Berlin S. W. Wilmsstr. 5. — Red.

La unua traduko de la „Sprita Junkro“ aperis en angla lingvo dum la jaro 1612 en London. — Antaŭ kelkaj jaroj, eldonisto germana publikigis gravegan eldonon de tiu verko en 20 volumoj. — Dekok el tiuj volumoj enhavas ĉiujn tradukojn de Don Quixote faritajn en aliajn lingvojn; la aliaj du volumoj enhavas la kringojn de 200 diverslandaj verkistoj pri Cervantes kaj lia verko.

Tamen li mortis en Madrido kiel mizerulo la 25. aprilo de 1616 tute forgesita de ĉiuj, ĉar nur la poeto Lope de Vega, granda amiko de Cervantes, sciigis pri lia morto, kaj li vizitis la kadavron malmulajn horojn antaŭ la enterigo de tiu senmorta homo.

Oni enterigis lin la sekvantan tagon en la monaĥejo de la Trinitarinoj. Kaj ĉar neniu surmetis signon sur la ŝtonon, kiu lin kovris, oni ne sciis, kie ripozas liaj cindroj.

Mi ne lacigos plu vian atenton kaj mi resumas. Cervantes estis tiu, kiu plej bone komprenis la valoron de la kastila lingvo.

Li plibonigis kaj riĉigis la lingvon, kaj li plialtigis ĝin ĝis la unua vico inter tiuj kiujn oni paroladis en la tuta mondo.

Li proklamis tre laŭte la nomon de sia patrujo, kaj en la lingvo, kiun li lernis en la kara lando de sia naskiĝo, li modelis la verkon plej mirindan kiam rememoras la jarcentoj.

Li verkis la D. Quixote, originala libro, satiro sen galo, kiu ridigas ofendante nek la religion, nek la leĝojn, nek la bonajn morojn.

Pri Shakespeare morinta la saman tagon mi iom klarigos al vi. Li estis la vera kreinto de la angla teatro. Li ankaŭ estis granda genio, kiu sciis kovri siajn verkojn per la belajtoj de sia inspirado. Neniu poeto havis imageman povon similan al tiu de Shakespeare. Li verkis verne eksterordinarajn poezion kaj teatrajn verkojn kiel „Othello“, „Hamlet“ kaj „La Marvenego“. Certe vi ĝuis la legadon de la Esperanta traduko de „Hamlet“ majstre tradukita de D-ro Zamenhof. — Neniu priskribis kiel li la tempon kaj la sociajn klasojn. — Shakespeare priskribis mirinde en siaj verkoj la vitojn kaj la malvitojn, la senkuragaĝojn kaj la esperojn kaj ankaŭ la homajn pasiojn. La morto fatis la vivojn de Cervantes kaj Shakespeare en la sama tago, eble por ke oni ne forgesu la daton de la 25. aprilo. Pasis la jaroj, sed kvankam peris ambaŭ genioj, iliaj verkoj eterne vivos. — Aliaj generacioj ilin studadis kaj ili trovis superbelegajn paĝojn.

La tempo purigas la faktojn, kaj tiel nian genian Cervantes nun admiras ĉiuj popoloj kaj rasoj; kaj la dramaturon anglan ĵustigas la germanaj verkistoj, al kiuj ŝuldas Shakespeare la publikigon de siaj ĉarmaj verkoj, kiujn ne sciis esti pli samlandano.

Kaj mi finas ĉi tiun artikolon dediĉante al tiuj genioj ne komprenataj en tiu epoko la vortojn skribitajn de Cervantes ĉe la fino de lia magia novelo: „Tie ĉi, Cide Hamete Ben Engeli, pendigis sian plumon, sed tiel alle, ke neniu kuraĝos preni ĝin.“

Originale *Eugenio Lunate*, Baracaldo (Hispanujo).